Heinrich Heine,

# [En la monat' belega, Maj']

*tradukita de Ludwig Emil Meier*

En la monat' beleg, Maj',
Dum ĉie brilas floro,
La amo ekvekiĝis, ja,
Ankaŭ en mia koro.

En la monat' beleg, Maj',
Dum la birdara kanto,
Mi ekkonfesis al ŝi, ke
Mi estas ŝin amanto!

*Traduko de la Germana poemo "[Im wunderschönen Monat Mai]" de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Ludwig Emil Meier *(∗1847-02-16 – †1919).*

*Arg-556-1124 (2010-09-14 15:46:07)*

*Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi tradukon el la libreto "H. Heine - Libro de Kantoj", eldonita en 1911 de la "Esperanto-Propaganda Instituto" (Leipzig, Kaiser-Wilhelm-Str.15), 2a eldono. [Sur la frontpaĝo de la kajero estas malsupre indikita ankaŭ: Eldonejo Rothermel, Friedrichswerth (Thüringen) kaj supre: Popola Biblioteko Esperantista n-ro 2.] La origina germana-lingva versio de Heinrich Heine troviĝas en ties verko "Buch der Lieder", sekcio "Lyrisches Intermezzo", sekcio I. - Informoj pri la tradukinto Ludwig Emil Meier troviĝas en la vikipedia retejo* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Emil_Meier`.

Heinrich Heine,

# [En Majo, kiam ĉiuj]

*tradukita de Manfred Retzlaff*

En Majo, kiam ĉiuj
burĝonoj malfermiĝis,
en mia koro tiam
la amo ekfloriĝis.

En Majo, kiam ĉiuj
birdetoj sin aŭdigis,
al ŝi deziron mian
sopiran mi sciigis.

*Traduko de la Germana poemo "[Im wunderschönen Monat Mai]" de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04).*

*Arg-556-1125 (2010-09-14 15:51:15)*